

Heinrich Heine,
Alpremu la vangon al mia vang'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Alpremu la vangon al mia vang',
Ke niaj larmoj kunfluu,³
Kaj vian koron al mia kor',
Ke niaj flamoj unuu.⁴

Se en la flamon enverŝas sin
De niaj larmoj fluo
Kaj se mi firmege brakumas vin
Mi mortas pro la am-ĝuo.

*Traduko de la Germana poemo "Lehn deine Wang' an meine Wang'" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-542-1087 (2010-05-27 09:07:40)

El la "Libro de la Kantoj", parto "Lirika intermezo, I".

³aŭ: Ke niaj larmoj kuniĝu,

⁴aŭ: Ke l' flamoj unuiĝu.